
KONGRESA KURIERO

# DRAKO DE BRNO

4

2025-07-29

de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 26 julio – 2 aŭgusto 2025



## NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA ELEKTITAJ EN BRNO

Laŭ la Regularo pri Honoraj Membroj, Honoraj Prezidantoj kaj Diplomo pri Elstara Agado la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA) surbaze de propono de la Estraro de UEA povas aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado, per la titolo Honora Membro (HM). Krome kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomumita esperantisto, kiu aldone havis eksterordinarajn meritojn por UEA.
Dum sia unua kunsido en Brno la Komitato elektis 10 novajn HM-ojn:
- el Ĉeĥio Miroslav “Mirek” Malovec;
- el Italio Michela Lipari;
- el Brazilo Paulo Sérgio Viana;
- el Nov-Zelando kaj Hungario Stefan MacGill;
- el Aŭstralio Trevor Steele;
- el Keio Lee Jungkee;
- el Svislando Mirejo Grosjean;
- el Hungario kaj Germanio Zsófia Kóródy;
- kaj *in memoriam* el Ĉinio Wang Chongfang kaj Wei Yida "Vejdo".

**La koncerto de “Duo Bemolo”**, autaŭplanita por lundo la 27-a de julio je la 15:00 en salono Corsetti, estas prokrastita al ĵaŭdo je la 18:30 en salono Höger.

**Rendevua tabulo** troviĝas apud la informejo en la konstruaĵo X. Nun tie troviĝas sciigoj por kongresaj numeroj KN: 86, 850, 22, 526, 44, 26, 149, 24, 960, 837, 722, 1089, 926, 990, 971

### Koncerto de Amira Chun

mardo 15h15-16h30, salono Höger

## Lastmomentaj aliĝintoj

1104 S-ro Ioan Crâncău, Rumanio
1105 S-rino Makrina Crâncău, Rumanio
1107 S-ro Nikodém Krupa, Slovakio
1118 S-ino Simone Cajelot, Francio
1123 Magistro Dorota Szczygieł, przyjaznadlon.100@gmail.com, Pollando
1124 S-ino Nathalie So Yun Kesler, nathaliekesler@gmail.com, Francio

## Ekumena diservo

Dimanĉe posttagmeze en la Ruĝa Preĝejo iom pli ol 40 kristanoj el 6 diversaj eklezioj (ortodoksa, rom-katolika, reformita, husana, luterana kaj ĉeĥaj fratoj) kune festis ekumenan diservon. Temo: "Kiu estas la plej granda?"
Per la post-la-dua-modmilita ekzemplo de la ĉeĥo Přemysl Pitter, kiu dum la milito savis pli ol 800 judajn kaj germanajn infanojn je granda persona risko antaŭ la morto, la predikinto Wolfram Rohloff, Germanio, klarigis la volon de Jesuo, ke ni respondecas por homoj, kiuj bezonas helpon.
La diservon kun Sankta Manĝo gvidis pastoro Vladimír Karbusický, Ĉeĥio, kuncelebris pastrino Miora Raveloharison, Malagasio.
La mondonacoj estis por helpi homojn kontraŭ nenecesa blindeco (fondaĵo Zienderogen), trafa, pro la fakto, ke Zamenhof estis okulisto, kaj ke tiun laboron fondis 1966 nederlanda esperantisto Jacques Tuinder.

# Nacia Vespero

Dimanĉe vespere en la kastelo Špilberk dum Nacia Vespero prezentis sin folklora grupo de **Jožka Imrich** kun popolaj kantoj kaj dancoj kaj artistoj de Nacia Teatro en Prago **Ivan Acher** kun **Vanda Šípová**, kiuj prezentis tri ariojn el opero Sternenhoch kaj kanton pri luno el Najado de Antonín Dvořák. La programojn anoncis **Věra Barandovská-Frank**. La koncertoj okazis en la kastela korto, ne mankis tie budoj kun biero, vino, viandaĵoj.

# Esperanto-arbo

En la botanika ĝardeno de Mendel-universitato kreskas arbeto **likvidambaro storaka** (*Liquidambar styraciflua*). Lunde matene estis tie senvualigita tabulo kun surskribo **Arbo de internacia interkompreno – Strom mezinárodního dorozumění okaze de 110-a UK 2025 en Brno.** La arbon donacis Mendel-universitato. Pri la arbo rakontis direktoro de la ĝardeno inĝ. Michal Pavlík, kies patrino estis esperantistino. Tiu arbo havas grandajn verdajn foliojn en la formo de kvinpinta stelo.

# Kosmo per ĉiuj sensoj eĉ en Esperanto

Stelobservejo en Brno estas por ĉiuj vizitantoj. Kun ĝojo ĝi bonvenigos ĉiujn teranojn kaj same ankaŭ eksterteranojn (fine, ĝi estas kontaktcentro por ili) kaj ili ne disreviĝos eĉ tiam, kiam ĝian pordegon frapos amantoj de Esperanto. Kaj ĝuste tio okazos fine de ĉijara julio. Kadre de Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Brno, vizitos la stelobservejon multnombra trupo da esperantistoj. Laborantoj de la observejo tial ne hezitis kaj spektaklon “Kosmo per ĉiuj sensoj 3D” pliriĉigis je lingvo, kiu por dekoj da miloj de aktivaj parolantoj de la tuta mondo estas ilo de egala internacia komunikado.

Kiel la nomo aludas, spektaklo “Kosmo per ĉiuj sensoj” el metiejo de Stelobservejo kaj planetario Brno prezentas la kosmon, kiel ni sentas ĝin per homa korpo. La spektantoj ekscios, kia la kosmo estas palpante, kiel ĝi odoras, sonas kaj gustas. Nur sur *Kraví hora* (Bovina monto, kie la stelobservejo situas) la spektaklon jam vidis ĉirkaŭ 12 000 kosmonaĝantoj, ĝia projekciado estas preparata en Ulverstone en Tasmanio, Maine en Usono aŭ Žiar nad Hronom en Slovakio. Kaj ĉar ĝi interesigis internaciajn produktantojn dum Fulldome Festival Brno, ĝi atingis internacian oferton de kelkaj tutmondaj distribuantoj. Nove ĝi estos disponebla ankaŭ en Esperanto kun komentario de Mirka Tomečková, kies voĉon registris kaj muntis Roman Kašník el studio RESET el Brno. La scenarion el la ĉeĥa esperantigis Oldřich Arnošt Fischer kaj Miroslav Malovec, esperantistoj el Brno.

Kaj tio ne estas ĉio. Vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio estas israela astrofizikisto profesoro Amri Wandel, kiu en la stelobservejo en Brno por kongresanoj merkrede la 30an de julio preparos unikan komentitan observadon de nokta ĉielo en Esperanto. En la scienca mondo li estas fakulo pri astrobiologio, astrofiziko de altaj energioj, nigraj truoj kaj aktivaj galaksiaj kernoj.

Ni el la stelobservejo amas kosmon.

Kaj ni ĝojas, ke vi en Esperantujo amas ĝin kun ni.

**Restas ankoraŭ kelkaj lokoj por tiu ĉi unika ekskurso. Aĉetu biletojn en la akceptejo.**

# Ricevu donacon per Nano

Kiel partoprenanto de UK vi povas ricevi etan donacon per natur-amika ĉifrovaluto Nano ($XNO). En vian poŝtelefonon instalu la aplikaĵon WeNano kaj ŝaltu lokigon. Malfermu WeNano-n en la ĉefa kongresejo aŭ en kelkaj aliaj lokoj kie okazos programeroj, klaku al la "punkto" de la kongreso kaj rivevu la donacon. En la

serĉilo serĉu "Esperanto" por listigo de ĉiuj lokoj. (la servo uzas simile malmultan elektron kiom bankokartoj)
https://wenano.net

KN 1092, KuboF Hromoslav
(Michal Matúšov)

# Merkreda Naturisma Ekskurso

**Laŭ la veterprognozo, merkredo estas la sola senpluva tago de tiu ĉi kongresa semajno. Tiu estas bona kialo por sperti agrablan naturisman ekskurson apud lago.**

INOE – Internacia Naturista Organizo Esperantista – proponas al vi ekskurson al naturisma plaĝo apud la akvobaraĵo de Brno. La eskurso estas malfermita al ĉiuj, kiuj ŝatas sperti senvestaĵan ripozon kaj aktivaĵojn. La ekskurso estas senpaga krom la transportkosto (40 Kĉ por ĉiu vojo ŝipe). La rendevuo estas je la 11:00 matene akurate, fronte de la kongresejo. Ni iros tien per tramo (senpaga por kongresanoj) kaj per ŝipo. Kunportu piknikon, bantukon, bonhumoron, plaĝludojn sed ne bankostumon.

**https://www.esperanto-naturismo.org**

# Novaj programeroj:

ĵaŭdo, 16h30 - 17h00, salono Ginz - Aŭtora duonhoro de Roman Dobrzyński: "Romano pri Romano".
vendredo, 10h45 - 11h30, salono Ginz - Prezento - Servoprete via - omaĝe al Claude Gacond
vendredo 16h00 - 16h30, salono Ginz - Aŭtora duonhoro - La senco legi rakonton "La senco de musa vivo"

# Tre interesa momento sen la preleganto

La preleganto Eric Baeni el DR Kongo (KN 822) ne ricevis vizon, do ne aperis en Brno. Aleks Kadar volis nuligi la sesion. La partoprenantoj jam komencis forlasi la salonon. Mireille Grosjean (KN 100) alvenis kaj proponis sin por paroli pri DR Kongo, kies historion ŝi esploris kaj pri kiu ŝi sekvis diversajn kunsidojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo kadre de la Homrajta Konsilio.

Do tiel evoluis la kunsido pri DR Kongo. Mirejo raportis pri la konstantaj forrabadoj de krudmaterialoj efektivigitaj de Okcidentanoj, pri la militmetodoj kaj la kruelaj perfortoj, seksaj perfortoj, kiuj detruas la korpon de la virinoj. Riĉigis la kunsidon raporto de Elisabeth Barbey, kiu gastigis kongolandanon fuĝantan el sia lando. La alveno de Espoir Ngoma Kasati (KN 814) ebligis havi rektan raporton pri la situacio en Orienta Kongo, en la regiono de la Grandaj Lagoj. Espoir fuĝis plurfoje en sia vivo tra sia lando, kun familio kaj poste sola, kaj kun li ni aŭdis pri la kaptado de knaboj por fari el ili infansoldatojn. Li ankaŭ konfirmis, ke oni multe detruas la arbarojn, ĉar soldatoj uzas la arbaron por kaŝi sin.

Sekvis tre interesa prezento de Frico, KN 868, kiu raportis pri siaj agadoj por kolekti monon por subteni afrikajn agadojn, kiuj estu daŭripovaj kaj vere kontribuu al vivteno por afrikaj esperantistoj. La bazo de tia agado estas, ke oni ne donu fiŝon al homo, sed oni faru el li fiŝkaptiston, provizu lin per materialo kaj metodo.

Naskiĝis la ideo havi platformon por **raporti** pri ĉiuj agadoj de esperantistoj en Afriko en daŭripova metodo kaj **observi, subteni kaj kunordigi** tiajn konkretajn kaj ekonomiajn agadojn. Tiu ideo iros al la Estraro de UEA.

**Mireille Grosjean ”Mirejo” KN 100**

# Anoncoj de kongresanoj

■ ESPERANTO-INFO (dulingva kvaronjara revuo) Jean François Cousineau KN488 serĉas E/france parolantoj el

Kebekio -Azio -Afriko por verki unu fojon jare artikolon pri Esperanto (en la franca) kaj pri tradicioj/rakontoj de sia lando (en Esperanto).
Kontaktu KN 488

■ Mia duonhoro okazos mardon matene 11h00-11h30 en la Libroservo, kaj mi parolos pri mia traduko de la romano *Aferoj disfalas* de la fama niĝeria verkisto Chinua Achebe.
Anna Löwenstein

■ Ateistoj invitas vin al la kunvenoj de ATEO, marde en la salono Urbanová 12h30-13h00. Kunsido por ATEO-membroj 13h00-14h15. Publika kunveno por ĉiuj interesatoj: Diskuto pri la temo "Ĉu necesas en la hodiaŭa Eŭropo?" Ĉiuj estas bonvenaj, ĉu nekredantoj aŭ ĉu kredantoj.

■ Ĵaŭde la 30-an de julio: Koncerto de Richard Haan kaj Jolana Smyčková
Dum la koncerto kunligos sin la ĉeĥaj kaj mondaj opero kaj opereto kun kantoj de la fama ĉeĥa teatro Semafor, kiu jam 66 jarojn dominas al la ĉeĥa muzika scenejo. Vladimír Türk kaj Pavla Dvořáková tradukis speciale por la UK 2025 la kantojn de Jiří Suchý kaj Jiří Šlitr, kiuj do eksonos la unuan fojon, sed espereble ne la lastan fojon.
Kun la geedzoj Jolana kaj Richard Haan kunkantos ankaŭ iliaj du talentaj filoj, kiuj jam kelkajn jarojn ludas kaj kantas profesie, malgraŭ tio ke ili havas 10 kaj 12 jaroj.
La vesperon akompanos la orkestro de Semafor sub gvido de la teatra direktoro Jiří Jan Nepomuk Svoboda.

■ Lia Moŝto S-ro Jaume Domènech, urbestro de Subirats, kataluna urbeto apoganta la diskonigon de nia lingvo kaj konservanto de la heredaĵo de S-ro Lluís Hernàndez-Yzal, salutas la kongreson kaj deziras sukceson por ĉiuj la kongresaj eventoj. La magistrato de Subirats kaj Kataluna Esperanto Asocio aparte invitas ĉiujn kongresanojn al la prezento de la projekto Spaco Esperanto en salono Gacond la vendredon je la 10h45

■ 76-a Kongreso de IKUE. Tuj post la 110-a UK, en Brno inter la 2-a kaj 9-a de aŭgusto okazos la 76-a Kongreso de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kun la temo "Pilgrimado en la lumo de la kredo".
La kongresejo, kie oni ankaŭ prizorgas la tranoktadon situas en la centro de la urbo.
Ankoraŭ eblas aliĝi.
Se vi bezonas pli da informoj, skribu al: ikuekongreso@gmail.com aŭ kontaktu Marija Belošević, KN 164.

■ Morgaŭ vespere ne hezitu kaj venu al salonoj Höger! Vi spertos ion mojosan! Venos koncerti muzikbando ŠAFRDA MEMORY BAND, muzikantoj kun bonega kantisto! Kaj ĉerizo sur la torto estos tekstoj de kantoj projekciataj sur ka ekranoj. Vi bone komprenos al la kantataj tekstoj. Ĝuu ilin, multajn brile tradukis nova honora membro de UEA Mirek Malovec! Kaj tiuj, kiuj ŝatas kanti, NEPRE KUNKANTU!

■ Alvoko al la iamaj interlingvistikaj studentoj
Dum la tago de lernado (salono Corsetti) okazos la transdono de iuj diplomoj marde je la 11.50. Poste ni iros kune tagmangxi.
Bonvenon Ilona Koutny

■ Tiuj, kiuj trovis la salonon Čejka ĉi-matene, aŭskultis belegan prelegon pri la riparo de la preĝejo Notre Dame en Parizo post la fajrego de 2019. Pierre Grollemund, mem iama tegmentisto, preskaŭ rekomencis la fajron, ĉar li certe ardas pri sia temo.
Li montris la efektojn de la fajro sur la preĝejo, klarigis la multajn defiojn dum la ripar-laboroj kaj donis surprizajn detalojn pri la konstruaĵo. La bezonatajn fakvortojn li priskribis bone kaj klare. Vere kleriga lunda prelego - dankon! KN. 504

**Anoncojn por la kongresa kuriero**
Drako de Brno bonvolu sendi al la redaktoro
**drako@esperanto.cz**
ĝis la 16a horo.

Redaktoro: Miroslav Malovec
Provleganto: Marek Blahuš